

Heinrich Heine,
Dum sun-subiro staris

tradukita de Manfredo Ratislavo

Dum sun-subiro staris
Ĉe l' maro la fraŭlin'.
Suspirojn longajn faris,
Kortuŝis tio ŝin.

„Ĉu vi pri tio miras?
Malnovas tio ĉi!
Ĉi tie ĝi subiras,
Deposte revenas ĝi.“

*Traduko de la Germana poemo “Das Fräulein stand am Meere” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1985-05.04.*

MR-184-1 / Arg-471-909 (2008-05-12 17:22:43)

Heinrich Heine,
Fraŭlino ĉe la maro staris

tradukita de Kálmán Kalocsay

Fraŭlino ĉe la maro staris
kaj ĝemis kun sopiro,
kortuŝon tiel grandan faris
al ŝi la sunsubiro.

Fraŭlin', gajiĝu senbadaŭre,
vin olda scen' katenas:
la sun' foriras ĉi-antaŭe,
postdorse ĝi revenas.

*Traduko de la Germana poemo “Das Fräulein stand am Meere” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-471-1078 (2010-05-22 11:49:29)